



HET STANDPUNT VAN Z. EXC. DE HEER NAEGELEN.

Minister van Nationale Opvoeding in Frankrijk,
in zake de internationale taal.

Het "Journal Officiel" van 21 Aug. 11. bevat het antwoord van de Minister van Nationale Opvoeding aan de Heer Lucien Amat van Toulon, die gevraagd had dat het Esperanto op de schoolprogramma's zou voorkomen. Dit antwoord is zeer gedetailleerd.

Het begint met te zeggen dat "het belang van een waarlijk internationale taal schijnt niet meer te kunnen geloofd worden". Hij bevestigt verder "dat de laatste oorlog de onderlinge afhankelijkheid van al de naties ter wereld bewezen heeft". Maar "dat ongelukkiglijk een der grootste moeilijkheden voor de onderlinge verstandhouding in de veelheid der talen ligt".

Het eerste deel van zijn betoog sluit met de woorden: "de enige oplossing wordt ons door 'n internationale taal gegeven". Dan overzouwt de Minister de verschillende oplossingen die reeds werden voorgesteld: het Latijn, de levende talen, zonder het Frans te vergeten. "Al de beschaafde vreemdelingen, schrijft hij, gaan akkoord om de buitengewone verdiensten van het Frans te erkennen. Twee eeuwen lang is het de voorkeurstaal geweest van kunstenaars en diplomaten, maar de politieke verzwakking van ons land sinds een 30 tal jaren, laat ons niet meer toe te hopen, dat de Angelsaksische volkeren ten voordele van het Frans er zullen van afzien de eretitels van hun gemeenzame taal te doen gelden".

Bij de behandeling van het Engels dan, verklaart de Minister: "Niettegenstaande de moeilijkheden van de uitspraak en de schrijfwijze heeft het Engels op het Frans het voordeel van een veel minder ingewikkelde spraakkunst. Een Engelse geleerde, Dr. Ogden, is er in geslaagd een vereenvoudigde taal op te bouwen, getrokken uit het gewone Engels en herleid tot 850 woorden met 18 verbale vormen met dewelke men zich gemakkelijk en correct kan uitdrukken (degenen die er ondertussen de ondervinding van hebben opgedaan, weten dat het tegenovergestelde het geval is: nota van de ondergetekende) "Het Basic English", ook met zijn ernstige tekortkomingen, schijnt meer kans te hebben dan het Frans, om als internationale taal aangenomen te worden, moesten alle volkeren die zich min of meer normaal van het Engels bedienen in hun dagelijkse handel en wandel, overeenkomen het gebruik ervan aan te raden. Het is klaarlijk dat het niet in het belang ligt van Frankrijk de ontwikkeling ervan te bevorderen. Het zou aan de Engelssprekende volkeren een gevaarlijke suprematie geven op de domeinen der politiek, economie en cultuur". (opgedragen aan al degenen die nog geloven dat eens een of andere nationale taal zal aangenomen worden als internationale hulptaal: nota van ondergetekende) Mr Naegelen besluit dan ook: "Het schijnt me dus toe dat we moeten terugkeren tot de idee van een kunstmatige taal". De Minister behandelt dan de argumenten die men aanhaalt tegen de kunstmatige talen. In dit gedeelte zegt hij o.m.: "Het is zeker dat in al de landen, de tijd, door veel kinderen gebruikt om vreemde literaturen te lezen, beter zou gebruikt worden, in plaats van met veel moeite en dan nog slechts de elementen alleen te leren, moesten zij toegang hebben tot vertalingen die het voornaamste zou bijdragen van de gedachte der groten die bijgedragen hebben tot de verruiming van onze kennis. In plaats van te trachten - en dikwijls dan nog tevergeefs - twee of drie vreemde talen oppervlakkig te leren, zou het intellectueel, voor de meerderheid der kinderen, veel voordeliger zijn één taal goed te leren, en zich tevreden te stellen voor het overige met een hulptaal, die zonder moeite ons zou toelaten in betrekking te komen met beschavingen die zeer dikwijls voor ons totaal gesloten blijven. (opgedragen aan sommige paedagogen (?) die het een schande vinden dat men nog het Esperanto zou opgedrongen worden aan de jongens die reeds zoveel andere talen moeten leren (nota van ondergetekende)).

AL LA GEMEMBROJ DE "PACO & JUSTECO".

" Jen mi finfine estas, eta revueto, ligileto konkreta inter la movado kaj la grupo unuflanke kaj inter la estraro kaj la geanaro aliflanke. Mi ne ekestis sen pezaj zorgoj nek multega laborado; mi ankaŭ ne ekestis kiel la amerikaj fungourboj sed nur post longa pripensado kaj pro-kaj- kontra paroladoj de la estraro. Tial, karaj gelegontoj, estu ne tro kritikema je mi kaj preparu al mi la akcepton kiu decas al amiko je kiu oni longtempe vane sopiris kaj kiu hazarde finfine nin vizitis. Pardonu al mi la malluksan kaj laŭ-cirkonstancan aspekton de mia mieno. Memoru la flandran proverbon ke : "Sub maldelikata ŝelo sin ofte kaŝas ora koro" kaj iĝu konvinkita ke mia enhavo, kvankam nezoŝe prezentita, estas al vi, estimataj gesamgrupanoj, tiu ora koro. Ĝi ekde nun senĉese batos nur por ĉiuj de vi, sciante ke ĝi estas tiel nepre necesa al via Esperanto-intelekta vivo kiel la homa koro al via korpa ekzisto. Per ĝia bonfarta funkciado je via intenco ĝi pruvos humile alporti al vi pliriĉigon de via Esperanto-kono, okupadon agrablan dum tedaj horoj, kunvivadon senĉesan kun la tuta grupo, amuzon seriozan post la laboro ĉiutaga. Kial do, miaj karaj gelegontoj, ne ŝategi kaj ambaŭmane akcepti min kaj vin fidi al tiu ora koro sub maldelikata ŝelo ?

"NE KONATA, NE ŜATATA"

oni diras. Pro tio mi iomete parolos pri mi mem por ke vi tuj ekonu kaj ekamu min jam je l'unua renkontiĝo tiel kiel... nu ja, kiel bela blondulino.

Mi eniris sendemande vian nunan preskaŭ mortan E-aktivecon - kaŭze de la hodiaŭaj ficirkonstancoj, mi konsentas - ĉar mi sentis la necesegon iomete, kvankam tute ne sufiĉe, anstataŭigi kiel eble plej bone kaj plej baldaŭ la momente ne plu aperantajn E-gazetojn. Mi do intencas doni al vi la intelektan nutrandon kiu al vi mankis kaŭze de neebleco aboni al E-revuo en-kaj eksterlandaj. Krom tiu ŝefafero mi min ankaŭ prezentis vin helpi por iĝi bonegaj gesesperantistoj, por vin sentigi ke vi ion posedas estante gemembroj de "Paco & Justeco", vin grupigi kvazaŭ en unu familio kiel decas al geanaro de sama unuiĝo. Unuvorte mi laboros nelaciĝante por POSTULI DE VI ĈIUJ - sen ke vi eble sentos ĝin - PLI DA AKTIVECO EN KAJ POR NIA KARA MOVADO.

Jen vi konas min. Al vi juĝi se mi indas esti via amiko. Mi arde esperas ke mi kapablos konkeri ĉiujn korojn de la geklubanaro ĉar estos vi, karaj gelegontoj, kiuj decidis pere de via entuziasmo aŭ de via malintereso pri la daŭra vizito de mi, bona verd-kora fidela E-amiko, al vi . "

JEN KARAJ GELEGANTOJ KAJ GEGRUPANOJ, RION MI SKRIBIS EN LA UNUA ARTIROLETO DE LA UNUA NUMERO DE NIA REVUO, TIAM ANKORAŭ TITOLITA "ANTAŬEN";

Jam ses jaroj pasis depost tiam. Multaj el nia mezo ne kapablas imagi kiom da energia laboro la eldono postulis de tiuj kiuj libervole prenis la taskon sur si por kontentigi bezonegon urĝan en Esperanto-mondo dum la pasintaj jaroj. Ne nur la spiritan taskon mi aludas, por ĉiam per decaj artikoloj plenigi kelkajn paĝojn monate, sed ankaŭ la materialan laboron por havigi paperon, multoblige la maŝinfrapitan specimenon ktp. Kaj ĉefe ni ne forgesu la riskan entreprenon de tiu sekreta eldono dum la 3 unuaj jaroj sub germana okupado.

Kortuŝas ĉiam kiam oni devas adiaŭi karan estaĵon. Similan senton havas la estraro de "Paco kaj Justeco" kaj cetero ĉiuj ĝiaj gemembroj je la aperigo de la hodiaŭa numero kiu estas ankaŭ la lasta.

Periodo de ses jaroj neforgeseblaj ni fermas per propravola decido de ĉesi la pluan eldonadon de "Paco & Justeco". Oni ne serĉu la kialojn en plej fantaziaj rakontaĵoj nek en malplivigliĝo de nia por-Esperanto idealo. Ni tutsimple haltas ĉar nia antaŭ ses jaroj proponita tasko finiĝis. Ne plu estas urĝa bezono al E° legaĵo, ĉe kontraŭe ! Kaj reaperis taŭgaj E° gazetoj kiuj daŭrigos la antaŭmilitan tradicion. Ni sekve preferas kunlabori je ĉiuj vidpunktoj profite de la E° idealo kaj movado. Ni ĉesas nian eldonadon esperante ke ni almenaŭ iomete da bono faris por nia kara mondlingvo dum la nigra periodo kiam malheliĝis super Esperantujo en la regiono de nia malnova Eŭropo.

La "eta revueto" de 1941 do post sesjara vivado malaperos el via mezo kaj same ĝentile kiel ĝi envenis en via rondo kun ridanta mieno ĝi nun adiaŭas la fidelulojn ĝis..... nu ĝis eble en estonteco se la situacio ĝin postulus.

Via sekretario Iserentant Roger.

B O T A N I K O - Novembro & Decembro.

Depost nia lasta promenado denove pasis unu monato. Intertempe ĉio en la naturo putriĝis kaj la arboj estas nudaj, senfoliaraj.

Oni ankoraŭ ĉiam trovas la berojn de la symphoricarpus (neĝbero). Ĉiu buleto enhavas du semojn. La birdoj tie ŝatas tiujn buletojn kaj ĝin multe manĝas. La semoj estas nedigestataj kaj eliĝas de la birda korpo kun la ekskremento; kaj tiel ili estas dismetataj. Sammaniere dismetiĝas la semoj de la Takso, rozoj kaj kornelarbo.

Intertempe nia atento estas vokata ĉar inter la branĉoj de arboretaro oni rimarkas la ruĝajn lanternsimilajn semojn de la "Jodenkers" (juda ĉerizo - Physalis Alkekengi). Ĝi estas planto el la sudaj landoj kaj ĝi malofte estas sovaĝa. La popolo diras al ĝi "kriekskēn in 't homd" (Gent) - (ĉerizeto en ĉemizo) aŭ "kriekskēn in den zak" (Excarde) - (ĉerizeto en ŝako). La nomo venas de la fakto ke la florkoliko daŭre kreskas post la florado de la planto kaj ĉirkaŭas la beron kiu similas al ĉerizo (kriek). La bero ankoraŭ estas ruĝa kaj enhavas multajn semojn kiuj estas dismetataj laŭ la antaŭa metodo per la birdoj.

Laŭlonge de la vojo, oni povas ankoraŭ vidi florentajn Taraksojn. Sed la plej multaj jam posedas pluŝojn kiuj atendas ĝis kiam la vento ilin forflugigas. La pluŝo ankoraŭ posedas la stangojn ke kiam estas malbela vetero kaj do kiam ĝi estas malseka la pluŝo malformiĝas kaj malpermesas tielmaniere la forflugadon. Kiam ĝi forflugas ĝi tre bone estas tenata kiam ĝi tuŝas al io ajn. Do ne mirinda fakto ke oni ĉie povas vidi la tarakson, sur tegmentoj, malnovaj muroj ktp.

La "tandzodā" (Bidens) havas alian manieron por dismeti la semojn. La fruktoj estas kvaranguloj kaj sur tiaj anguloj estas soppikiloj direktitaj suben.

Pri la decembraj floraĵoj oni nenion preskaŭ plu povas diri. Oni nur povas pensi pri la jaro kiu forpasis kiu al ni lernis tiel multe. Por amato la tempo rapide forflugas serĉante florojn kaj naturaĵojn. Nur en la naturo ni povas ĝui ĉion kion al ni donis Dio.

Verkis : Gilbert Bruyneel.

REKONSTRUKTO DE KROZVORTENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15
1								█							
2		█					█	█	█						█
3								█							
4				█	█						█	█			
5				█	█										
6						█	█	█	█						
7							█	█	█						█
8	█	█					█	█	█						█
9															
10									█	█					
11				█	█							█	█		
12				█	█										
13															
14															█
15															

1. HORIZONTALE :

- 1. sendube (R) - provincaĉeti; 2. adjektivo de nomo - maldolĉa (R);
- 3. nomo de floro - tiel klara, kiel ... (R); 4. malgranda -
- hindaĉestro - vicinseka; 5. haŭto (R) - modelulo - kinematografo (R);
- 6. nomo de floro - koloro (R); 7. prefikso - armito (R); 8. kun-
- juĝkcio - inklina; 9. malgranda dentskrapulo (R) - malplimultigo
- de frakcio; 10. esti ne malbrila - sono, kiu povas esti prononcata
- sen helpo de alia sono (R); 11. ne malsoka (R) - ŝanĝiĝema - sufikso;
- 12. ekstrinko (R) - mola korpparto - kantetadi (R); 13. mokus -
- ventego; 14. bildo, ĝis la brusto (R) - akceptigi (R); 15. neĝusta-
- tempa naskiĝo (R) - oficejo.

2. VERTIKALE :

- 1. nomo de fiŝo (R) - granda eco de azeno; 2. vaporiĝema iluaĵo (R) -
- iri returne (R); 3. kriplulo (R) - kaŭzas malsanojn; 4. ankoro (R) -
- ĉika persono (R) - konjunkcio; 5. inklino - poseda adjektivo (R) -
- sufikso; 6. pinta, fera objekto - ... -maŝinoj el 90° - angulo;
- 7. fruktedona regiono en granda dezerto (R) - la ruĝa ... (R)
- (la indianoj); 8. pers. pron. - marŝi (R); 9. alta forta herbo (R) -
- enuigi (R) - tediĝi (R); 10. ruĝa legomo (R) - ... Dio antaŭ ĉio!
- (unua ordono) - fino de la vivo; 11. la unua kaj plej granda devo
- de la homo al Dio - malrekta - rivero el Italujo (R); 12. preter-
- iri (R) - tabelo - akvero (R); 13. nomo de la vorto : "la" (R) -
- ki sukcese travivis la kvin terurajn jarojn de la germana ... ;
- 14. virina membro (R) - pinta ilo, uzata de la ŝuisto (R); 15.
- landnomo el Eŭropo - provo.

Verkis : A. Spruytte (el Poperinge)

D.P. en GERMANUJO

La Agado de niaj tieaj Ukrainaj Samideanoj.

Eble kelkaj de niaj legantoj ankoraŭ ne scias kion signifas D.P. Tio estas la mallongigo de "Displaced Persons" (deportitaj personoj); sub tiu nomo oni komprenas ĉiujn personojn kiuj pro iu ajn kaŭzo ne volas aŭ ne povas reiri al sia patrujo. Da ili estas nun en Germanio preskaŭ unu miliono ! En la regiono de Augsburg (historie tre proksima Germana urbo) estas precipe Lettoj, Lituanoj, Estoj kaj Ukrainoj. Ili havas tie tute apartan vivon sed bone kaj eĉ riĉe organizitan. Partoj kaj sporto tie floras. Revuoj atestas kaj raportas pri ilia multflanka laborado. Tamen la vivo estas por ili tute ne dolĉa. Oni povas imagi ke post tiu dua mondmilito, ĉiu povus reiri en paco al sia kara patrujo. Tamen tio ne okazis. Vere, ili ne volas sed estas ĉar ili tie ne povas vivi. Ĉu militkrimuloj aŭ perfiduloj ? Ne. Tutsimple ĉar ili bezonas liberecon kiel oni bezonas aeron. Kaj tiun liberecon ili ne havas en sia patrujo. Ili estas kontraŭ ĉiuj diktatorecoj kiuj sklavigas la homon. Kaj vere la Germana diktatoreco estas nun for sed aliaj ne ankoraŭ estas for.

Tiel ili preferas la ekzilan vivon kun ĝiaj multaj penegoj pli ol la sklavan vivon en sia natura medio. Kun amareco en la koro iu inter ili skribis en artikolo kiu aperis en "Ausland" (ilia gazeto) ke pli fruaj kondiĉoj estis ĉiam tre bone akceptataj sed nun ne plu. Depost ke Sauckel venigis tion da fremduloj por devige labori en Germanujo - fremduloj kiuj estis malŝatataj ĉar ili tie venis anstataŭ edzejn, fianĉojn, fratojn, patrojn al la militfronto forsenditajn - la ĝenerala animatato estas kontraŭ tiuj aliaj fremduloj kiuj nun okupas la teritorion kaj fine ankaŭ kontraŭ tiuj "deportitaj personoj" kiuj ne volas reiri al sia mortosimila patrolando sed kiuj restas en por ili fremda lando, loĝante en specialaj tendaroj, fakte sen hejmo.

Niaj Ukrainaj samideanoj klopodas nun por konigi al la tutmonda esperantistaro tiun vivon kaj tiujn personojn. Ili faras tion per la revuo "Ukraina Esperantisto" kaj per alsendo de materialo al tiuj kiuj demandas tion. Tiu dokumentaro montras interesan, altnivelan vivon de personoj kiuj kun optimismo, provas vivteni en siaj malbonaj kondiĉoj kaj tiu dokumentaro estigas grandan simpatian por ili. La ĵurnalo "Ausland" estas interese kun tre varia enhavo kaj kun interesaj fotografiaĵoj. La artikoloj varias de la batalpretaj dogmaj artikoloj ĝis la sciencej kaj artaj traktaĵoj. Oni vidas multajn fotojn pri naciaj okazaĵoj, festoj, dancoj, kantoj, k.t.p. (kompreneble la hejma nostalgio vivas en ilia animo kaj tio evidentiĝas). Broŝuroj atestas pri ilia literaturo kaj historio. La revuo "Ukraina Arto" en Ukraina lingvo, estas belega, kaj donas historian superrigardon komencante per mezaj ĝis hodiaŭaj ofte vere artplenaj kreitaĵoj. Mi ne kredas ke ĉiuj tiuj homoj estas ekzemplaj homoj. Ili mem eĉ ne neas tion. Vere la kontraŭo estus duonmiraklo. La malbonaj cirkonstancoj faris ke multaj de tiuj homoj iĝas senmoralaj. Kiaj estus ni en samaj cirkonstancoj ? Tio faras la vivon de tiuj komunumoj de D.P. ankoraŭ pli malfacila ĉar Germanoj akuzas ilin - tro ĝeneraligante - pri fikomercilaj praktikoj, pri ŝteladoj, k.t.p. Okazas tiam foje kaj foje ke polico kaptas ĝis fundan kaj nedolĉan priserĉon en tiuj kampoj. Kaj tiamaniere per interfratiĝado daŭre vidas malhelpaĵojn kaj eĉ ne progresas dum ke, se la cirkonstancoj ne aliiĝas, la malamo restas aŭ kreskas. Tial estas tiu ĉi tasko niun plenumas niaj Ukrainaj samideanoj. Sed ili faras ĉion kun hofa spirito. Tiel kontaktiĝu kun ili, demandu informojn pri ili kaj helpu ilin. Jen la adreso :

"UKRAINA ESPERANTISTO" ĉe
 M.V. DOLMYCKY - Augsburg-Göggingen
 Schliessfueh, 6, Bayern - U.S. Zone,
 Deutschland.

PACO & JUSTECO.

 SAMIDEANOJ : Por riparado de viaj ŝuoj, nur unu adreso :

 HUBERT VAN ROOSEBEKE - Calvariebergstraat, 8, Brugge
 5 % de rabato !

Sciindaĵoj pri la "libro".

Oni scias ke estas Jan Gutenberg de Mainz kiu unua fondas literojn el metalo kaj kiu tiamaniere komencis la presarton. Sed antaŭ li, Laurens Coster de Haarlem tranĉis jam literojn el ligno. Do ĉu ne li malkovris tiun arton? Kaj antaŭ li oni jam tranĉis tutajn tekstojn en lignaj platoj. Sed tia procedo vere esence malsimilas de la procedo de Laurens Coster. Ĝis la jaro 1500 oni nomas la presitajn librojn : INKUNABLO.

En la komenco tiu arto ne estis taksata laŭ ĝia valoro. Oni malsatis tiujn librojn, same kiel oni ankoraŭ nun ofte malsatas fabrikan, serian, artefaritan laboron kiu trudas sin anstataŭ la natura, mana, individue laŭgenia laboro. Tial la unuaj presistoj kiel eble plej baldaŭ imitas la manskribitajn literojn. Vidu nur tiujn unuajn librojn. Sed la civilizo progresas (?!) kaj nenio povis kontraŭstari la triumfan marŝon de la presado. Antaŭ la menciita jaro oni parolas ankaŭ pri "libroj" sed tiuj konsistis el aroj de manuskriptaj paĝoj aŭ platetoj.

La plej malnova libro estas la "PRISSE POPYRUS", nun en la nacia biblioteko de Paris, kiu datumas de 3350 antaŭ Kristo, trovita en tombo apud Thebe.

La plej granda libro estas anatomia Atlaso 1,90 m. x 0,90 m. presita inter 1823 - 30 nun en la biblioteko de Wien.

La plej malgranda libro havas 26 paĝojn kun poemoj de iu arabo, kaj havas la grandecon de cigaredfinajo. Du Amerikaj (kompreneble!) libristoj faris ĝin.

La plej peza libro, la Germana "Historio de ITHAKA", eldonita en la komenco de tiu-ĉi jarcento de Halsburga duko. Ĝi pezas 48 kg.

La plej multekosta libro estas la 42 linia biblio de Gutenberg por kiu, antaŭ kelkaj jaroj, Dr Vollberr pagis 1.300.000 markojn.

La plej ampleksa libro estas la Ĝina vortaro "TOE-SJOE-TSUI-TSSENG" el la 17-a jarcento kiu havas 5020 volumojn de po 170 paĝoj.

La plej disvastita libro estas la Biblio en ± 500 milionoj da ekzempleroj kaj en 630 lingvoj.

Estimate Samideano,

Laŭ nia propono daŭrigas la Ĉeĥoslovaka gimnasta federacio Sokol propagandi la grandan Sokol-feston 1948 per Esperanto. Ĝi aperis dua informilo, sed estos eldonita detala ilustrita broŝuro, anonncos sin sufiĉe da interesiĝantoj.

Bonvolu publikigi la subajn liniojn en via gazeto kaj
optu nian sinceran dankon.
Samideane,

Ceĥoslovaka Asocio Esperantista
P r a h a.

Ĝia esperanta informilo pri la Sokol-festoj en Praha 1948 ĵus aperis kaj ĝi estos senpage liverata al ĝiaj petinto.

Postulu samtempe pli detalan ilustritan broŝuron pri Sokol.

Adreso : Sokolsky stet, Praha III., Tyršův dům.

NOVA PACIFISTA MOVADO.

- 1. ricevis de S-ano P.L. Wright - Hoppers Road, 5, London, N.13 proponon por kunagado pri "Interkonsenta Arm-halto" laŭ jena programo :
- 1. Tuj detruu ĉiujn atom-bombojn - fermu la bomb-fabrikejojn.
- 2. Cesigu pluan varbadon de ĉiaj militistoj ĉie;
- 3. Mondkunlaboro por provizi al ĉiuj infanoj de milit-ruinigitaĵoj landoj, sufiĉe da nutraĵoj kaj vestaĵoj por plena sano kaj disvolviĝo.

1. sendis la jenan respondon :

Estimata Samideano,

Post legado de via manifesto, ni devas diri ke ni trovas vian gadon tre bela, tre bona, inda je ĉies simpatio kaj kunlaboro. Tamen ni permesas al ni jenajn rimarkojn.

Agado tia kia la via, por esti benefika, devas troviĝi en du kondiĉoj : 1. ĝi devas esti internacia kaj ni volas per tio precipe diri : disvastiĝi en ĉiuj landoj. - 2. ĝi devas havi ĉie ian liberecon por propagandi siajn ideojn kaj idealojn.

Ni faras ankoraŭ kromrimarkon, nome ke la vorto "militisto" ne ŝajnas al ni sufiĉe klara. Ni supozas ke vi komprenas per ĝi "soldato" .

Rilate la duan kondiĉon vi povus kompreneble argumenti ke tie kie ne ekzistas sufiĉa libereco, via movado laboros sekrete. En tiu kazo estus necese fari bonan distingon inter la neŭtrala E° movado kaj via pacifista ligo.

Rilate la unuan kondiĉon, ni pensas ke vi devas senrezerve akcepti ĝin. Supozu unu momenton ke via agado sukcesus en kelkaj landoj kaj komplete malsukcesus en tiel nomitaj malamikaj landoj, tiuj unusaj landoj troviĝus en granda danĝero kaj povus fariĝi viktimoj de la alianco.

Nu ŝajnas al ni ke vi havas nek la liberecon nek la oblecon por disvastigi viajn ideojn en iuj landoj. Se ni vidas ekzemple ke la "neŭtrala E° movado" tute sendanĝera kaj kiu nur povas fari bonon, ne havas kompletan disvolviĝeblecon en kelkaj landoj, oni pli forte povas pensi ke via movado ankoraŭ malpli kapablos flori, via movado kiun multaj opinioj prave an ne danĝera.

Tial ŝajnas al ni ke la unua kaj plej urĝa tasko ne nur por ĉiuj esperantistoj, sed por ĉiuj homoj de bona volo, estas laŭte proklami ke la homo devas ricevi unu de la fundamentaj aferoj kiuj faras la vivon vivinda; la liberecon : libereco de pensado, de esprimo, de interkomunikado, de moviĝo. Nur kiam tio estos plene afektivigita, ni povos sen timo kaj tute klare konatigi niajn ideojn. Kaj el tio povos naskiĝi la lumo en la ĥaoso de la miskomprenoj, la solvo en la problemoj kaj la porbonaj movadoj.

Kun esperantista saluto.

F. Roose,

Vicprezidanto de Flandra Ligo Esperantista
Prezidanto de "Paco&Justeco"-Brugge.

Jenan interesan cirkuleron ni ricevis kiun ni enpresas por ke ĉiuj redaktistoj pripensu.

Samideano redaktoro,

Ĉu vi ankoraŭ ne ŝentus, ke esperantistaj gazetoj estas "tro esperantistaj" ? Oni povas legi senfine diskutojn pri la utileco de Esperanto en praktika vivo, sed, ni konfesu sincere, la esperantistaj gazetoj plej multe ne estas modelo de la praktike uzado de Esperanto. Oni ne defendas ĝian utilecon por praktiko kaj erare supozas, ke tiu batalado helpas Esperanton. Ni devas, kaj tion ni substrekas, **MEM PRAKTIKE UZI ESPERANTON !** Ni estas ĝis nun tre idealistaj. Ni devas, ke nur malmultaj homoj estas tiaj, ĉar la ĉiutaga vivbatalado de homoj senigi sin de la superflua idealismo.

Skribu tial en viaj gazetoj pri :

- 1. ELSTARAJ VIROJ KAJ VIRINOJ,
- 2. TEATRO - sed ne pri partia politiko,
- 3. KROMO - kion vi produktas, eksportas, ktp.,
- 4. ARTO - teatro, filmo, danco,
- 5. SPORTO - piedbalo, ludoj,
- 6. KAPITO - viaj novaj aviadiloj, ktp...
- 7. MOBILIZMO - sukcesoj en la produktado, ktp.
- 8. FONO, ktp.

MEMIĈU TRIONON aŭ DUONON de la spaco en via gazeto al la supre nomitaj praktikaj aferoj. MI DO VOLONTE EKSDIUS ION PRI VI, pri via lando, ekonomio, tekniko, kaj pri ĉio, kion vi konscias interesa kaj utila por ni, viaj amikoj eksterlande, Mi petas. Ne skribu tiom multe pri graveco kaj utileco de Esperanto ! Pli ol ĉia diskutado konvinkas praktika uzo. La raportoj pri la vivo de via lando povas esti tre mal-longaj. Ekzemple :

"En Ĉeĥoslovakio oni konstruis novan malgrandan du-motoran aviadilon kun 210 HP entute, kiu atingas rapidecon de 350 km. en unu horo. Ĝi estas verŝajne la plej eleganta kaj rapida aviadilo en sia kategorio enmondo".

"En Praha okazis internacia festivalo de la demokrata junularo. Partoprenis 17.000 eksterlandanoj. Je la fino alvenis pluraj 100.000 junuloj el la tuta Ĉeĥoslovakio".

"La Ĉeĥoslovakia ekonomia plano estis plenumita por unua duonjaro je 100.5%".

Enmetu similajn raportojn pri via lando kaj sur la lastan paĝon de via gazeto faru rimarkon por viaj abonantoj.

"KAJ NUN SENDU LA GAZETON AL VIA EKSTERLANDA AMIKO " !

Preskaŭ en ĉiuj gazetoj en la tuta mondo ni vidas saman bildon, DITAJTOJ PRI ESPERANTO. Sed mi vokas. "Ĉesu jam kun diskutado pri Esperanto kaj uzu ĝin praktike !!" Ne estas do nia celo havi ESPERANTON POR ESPERANTO ! Esperanto estas ilo. Uzu ĝin do kiel alian lingvon. Ne ciru, se vi ne havas sufiĉe da spaco en via gazeto ! Vi havas ĝin. Ne menciigu bagatelojn, ekzemple sengravaj kunvenoj, ktp. Tio ne estas vivgrava por Esperanto. Kaj vi certe trovos sufiĉe da spaco.

Se vi skribos pri via lando, via progreso, kulturo kaj industrio, kaj igos viajn metitojn sendi la gazeton alilanden, VI SERVOS AL VIA PATRULO. Vi propagandos ĝin, vi gajnos al ĝi novajn amikojn. Tiel VI povos ricevi subtenon de viaj oficoj, institutoj, ministerioj kaj ĉiuj praktikaj homoj. Alimaniere ne.

PROVU TION kaj sendu al mi, se vi povos, unu ekzempleron de via gazeto, kun la nova enhavo. Mi dankas jam antaŭe kaj deziras al vi multan sukceson.

Samdeane salutas : Emil Zvadiĉ,
Praha - Karlín,
Královská, 103, Ĉeĥoslovakio.

ANGULO DE LA POEZIO

Kaj jen la lasta voĉo, la signokanto de nia kars kunlaboranto.

Het leven sijpelt stil verloren
door de holte van mijn handen
lijk het losse zand der duinen...
lijk de lange golvenvoren,
ijlend naar de lijn der stranden,
broken in fountain van schuimen...

Ik stond als kind aan de oever der stromen,
om mij was de lente, de zon en de wind...
Ik lachte stil om het wiegend geruis in de bomen;
het was in de lente en ik was maar een kind...
Nu sluiten zich boven mijn hoofd heel koele stromen,
nu zink ik naar de einders diep benéén...
Alles wordt zóó groen, met dieper hopen,
in 't blauwe diep vind ik mijn rust alleen...

Nu is de zingende zee zóó hoog daarboven,
de hemel diep-blauw, de wolken, de wind...
het ruisende lied aan de oever der stromen,
en de lach van mijn moeder naar haar kind...
Zoo kan ik niet vergeten, dat ik in vroegere tijden
bloem en blad beminde; en dat ik thans
de uren en de dagen door de holte van mijn hand laat glijden,
lijk mijn oud moederke de kralen van haar rozenkrans...

KIO TĈEDAT.